

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 62. Novembro 1, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Sume: KB 430

Aruŝa vokas – aliĝu nun en la unua kotiza periodo

Tiu unua periodo por la kongresa aliĝo daŭras ĝis la fino de 2023. Aliĝu subtene, eĉ se vi, kiel mi, ne povos fizike partopreni. Aliĝu ĉe: <https://uea.org/kongresoj/UK>. En la 1-a de novembro estas jam 134 aliĝintoj el 38 landoj.

Ĝis la jarfino, EKO aperigos praktikajn informojn pri la vojaĝo kaj restado en Tanzanio. Nuntempe teksto iras al afrikanoj kaj aliaj spertuloj por korektoj, atentigoj kaj aproboj.

Esperanto havas longan historion en Tanzanio. Jen Esperanta lernejo kun kvin klasĉambroj en Marambeka, vizitita en 2016 post la 6-a Afrika Eo-Kongreso en Bunda.



Ĉu vi volas trapasi Eo-ekzamenon rete en 2024?

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) estas unu el la plej gravaj servoj de UEA, realigitaj de ĝia KER-Ekzamena Centro, kunlabore kun la Akademio de Esperanto kaj la retejo <edukado.net>. Ili ekzistas en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 kaj eblas ilin trapasi surloke, en specifaj okazoj, aŭ rete, laŭ specifa kalendaro. Por la jaro 2024 KER planas retajn ekzamenojn je ĉiuj niveloj. Ankoraŭ ne estas certe pri surlokaj ekzamenoj. Pro tio tre gravas, ke interesatoj respondu enketon, per kiu eblas indiki sian interesiĝon trapasi la ekzamenon rete. La respondoj al la enketo povas influi la elekton de la ekzamena periodo. La enketilo por la jaro 2024 jam disponeblas ĉe <edukado.net> kaj UEA bonvenigas interesatojn ĝin respondi:

https://edukado.net/ekzamenoj/ker/!_enketilo.

La ekzamen-sistemo por la niveloj B1, B2 kaj C1 estas validigita de la ŝtata ekzamencentro ORIGO de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto. La

ekzamensistemo por la nivelo C2 estas validigita de la Akademio de Esperanto. La KER-ekzamenoj estas speciala stimulo al Esperanto-parolantoj je progreso kaj perfektigo en la kono kaj uzo de nia lingvo. Ili ekzistas laŭ la tipoj nur skriba, nur parola kaj kompleksa (skriba plus parola). Tiuj, kiuj neniam antaŭe ekzameniĝis, povas elekti la nivelon kaj la tipon en kiu oni fidus sukcese. Tiuj, kiuj jam sukcesis en iu nivelo kaj/aŭ tipo povas konsideri novan ekzameniĝon je pli alta nivelo kaj aliaj tipoj, se ne temis pri C2 kompleksa. Specimenoj pri ĉiuj niveloj kaj tipoj troviĝas ĉe <edukado.net>: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj>. Por ekzerci sin en la parolado (kaj ensociiĝi) UEA rekomendas la programon Ekparolu! de Edukado.net: <https://edukado.net/ekparolu/prezento>. Por regula legado kaj aŭskultado de tekstoj en facila Esperanto: <https://uea.facila.org>.

Aldone en la enketilo respondantoj povas informi, ĉu ili ŝatus partopreni apartan preparsesion por la retaj ekzamenoj (per Zoom), kiun KER okazigos je unu-du monatoj antaŭ la anoncota dato de la ekzamenoj. Eblas informi ĉu oni ŝatus trapasi prov-ekzamenon, per kiu oni povas en la ekzamenpaĝo interage solvi malnovan teston kaj ekscii sian rezulton. Tia simulita ekzameno multe povos helpi en tio, ke oni povu bone taksi sian nivelon. UEA kuraĝigas ĉiujn esperantistojn prepariĝi kaj trapasi KER-ekzamenon. Pri la KER-Ekzameno de UEA respondecas Katalin Kováts (direktorino), Zsófia Kóródy (reprezentanto de UEA ĉe Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo - ALTE) kaj Renato Corsetti (konsilanto)

Fonto: lomete koncizigita el Gazetara Komuniko de UEA.

Pakistana progreso

Mi daŭre gvidas vizaĝ-vizaĝe Eo-lecionojn uzante la libron de Stano Marĉek 'Rekta Metodo' ĉiu-ĵaude, sabate kaj dimanĉe ekde aŭgusto, ni ja atingis la 17-an lecionon, baldaŭ ni finlegos la libron, mi ja klarigas gravajn punktojn en la urdua. Novembre ni ekigos novan sesion de novaj lernantoj; se iu volas lerni Esperanton per la urdua, tiu estas kore bonvena al nia grupo, se iu loĝanto de la urboj Lahoro, Nankana Sahibo, Ĝaranvalo, Ŝeĥpurao kaj Fejslabado, ni povas gvidi ilin facile. Post ĉiuj tri monatoj, ni ekigas novan sesion, do ni faras tion regule. Pri la eblo iĝi sekciestro de ILEI en Pakistano, mi pensas, ke ni parolu pri tiu ĉi afero en decembro, mi ja iom liberiĝos kaj pretus funkcii kiel sekciestro de ILEI en Pakistano.



Adell Butt

Ne 'Monato', sed monatoj. Instruu la monato-nomojn!

Jen utila vidbendeto (malpli ol 5 minutoj) por instrui la nomojn de la monatoj en Esperanto. Donaco el Hispanio!

<https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcgZGtxSvQLpnpqTbshqzdPLcZpMXw?projector=1>
aŭ <https://www.youtube.com/watch?v=mk-0D3D75Ao>

Norvegio akceptis estraranon de UEA

La estrarano de UEA pri landa agado, precipe en Eŭropo, vizitis Norvegon. Aurora Bute en kunsido de NEL rakontis pri la neeblo forvendi la sidejon en Roterdamo pro malsufiĉe alta propono. Sama problemo ekzistas en Oslo pri la tiea sidejo. Lokaj

kluboĵ tra Norvegio funkcias en ses urboĵ: Oslo (kun sideĵo), Trondheim, Tromsø, Bergen, Bryne kaj Stavanger.

Laŭ numero 2023/2 de Norvega Esperantisto.

Filmo el Svedio alvenas pere de Hispanio

Geedza magio - Sten Johansson

<https://youtu.be/vZG1BYqZE-E>

mga



Fotoĵ prenitaj el 'Fenikso' la eldonaĵo de la nederlanda Landa Asocio de UEA.

20 minutoj por Esperanto en albana televido

Fine de oktobro TV Scan en Albanio dediĉis 20 minutojn al intervjuo kun mi pri Esperanto. La ĵurnalistoj Viola Gremi kaj Rudi Hizmo faris saĝajn kaj trafajn demandojn ebligante al mi prezenti la internacian lingvon pli klare kaj pli konvinke. Dankon al TV Scan!

Bardhyl Selimi.

Esperantistoj en Togolando aperas en grava ekspozicio

En la Togolanda Centro por Ekspozicioj kaj Foiroj de Lomeo (CETEF), malfermiĝis la 3-a forumo de la juna knabino fine de oktobro 2023. Ĉi-jare pluraj asocioj, inkluzive de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), respondis al la invito al la evento per sia partopreno en la malferma ceremonio. Ni laboris por rimarkigi nian partoprenon. Krom aktive kontribui al la programoj, ni produktis Eo-kalendaretojn kaj flugfoliojn surloke kaj proprarimede por informi kaj konsciigi pri la

internacia lingvo aliajn partoprenantojn. Kvankvam ni ne povis mendi budon pro limigita rimedo, en la praktiko, s-ino Kossivi Massan Judith kaj mi reprezentis la mondon de Esperanto. Ni disdonis plurajn centojn da flugfolioj kaj kalendaroj.

La evento estas rendezuejo por interŝanĝoj inter gejunuloj kaj kunhavigo de spertoj kun influaj personoj por konstrui inkluzivan estontecon kune. Knabinoj, junulinoj, junaj viroj, gepatroj, metilernantoj, opiniestroj, publikaj figuroj (artistoj, kulturaj agantoj, ktp.) politikistoj, kaj handikapuloj... ĉiuj ĉeestis ĉi-matene. Pluraj junularaj asocioj kaj pli ol 12.000 vizitantoj estas atendataj dum la 3-taga foruma periodo. Se vi interesiĝas pri Esperanto en Afriko kaj povas subteni nian agadon, ni danke akceptos vian donacon per la konto de APETO ĉe UEA: apto-c

Adje Adjevi.

La societo en São Paulo aktivas

La gasto de nia oktobra Kulturkunveno estis James Rezende Piton el Paulínia (SP), kiu parolis fine de oktobro pri la temo "La viro, kiu kalkuladis, instruadis kaj verkadis - Malba Tahan".



SMG: Antaŭ kvardeko da jaroj en Brazilo estis du aktivaj instancoj: BEL en Brazilio kaj Rio de Janeiro (la Landa Asocio de UEA) kaj la alia ege aktiva grupo estis tiu de São Paulo. Bonas vidi, ke ĝi plue aktivas.

AMO 103 nun en la Jutuba kanalo de UEA

<https://youtu.be/b4W4k2TjQ3c>

Memorige, jen la programo de AMO-seminario 103:

La temo estas "Virinoj kiuj ŝanĝis la mondon", kun kvar kontribuintoj:

- Malfermo kaj prezentaĵo "Virinoj en la Esperanto-movado" (Stefan MacGill)
- Ermanno Taracchini kaj Laura Barbieri – „Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni, du kuracistinoj kaj pedagog-sciencistinoj, kiuj dediĉis sian vivon al la edukado por nova mondo"
- Martha Otto pri Lidia Zamenhof
- Małgosia Komarnicka - "Maria Skłodowska-Curie - simbolo de virina forto"

===== vortoj: 1140 =====

La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.

Oni rajtas aperigi erojn el EKO en aliaj eldonaĵoj, sed ĉiam kun font-indiko: EKO-komuniko.